I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

N° 3 - 4 Marto kaj Aprilo 1960 10-a Jaro

## LA 12-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - KONGRESO

HELSINKI Finnlando - 11 ĝis 16 junio 1960

Adreso: Helsinginkatu 6 B 50, Bankkonto: 60264 P Y P Pohjois - Haaga, Helsinki
Korespondado: La sola kongreslingvo estas Esperanto. Persona korespondado nur kontraŭ respondkupono. Sendu la aliĝilon rekte al la L.K.K.
Kongreskotizo: Kongresano 1700 Fmk. Familiano kaj pensiulo 800 Fmk. familianoj malpli ol 15 jaraj senpage. Simpatianto 400 Fmk. (Ĉiu simpatianto, kiu estos paginta la kongres-kotizon, ricevos la kongreslibron kaj -insignon). Limdato por aliĝi: 30-a de aprilo 1960
Ekskursoj: La kotizo por la tuttaga ekskurso estas 1800 Fmk. por tiuj kiuj havas liberajn trajnbiletojn (inkluzive manĝadon dufoje kaj ĉiujn aranĝojn dum la vojaĝo).
Kiel pagi: La aliĝilo validas nur kun samtempa pago al la kongresa banko. Kongresanoj el landoj, el kiuj ne estas eble sendi la monon al Helsinki, sendu la monon al la landa delegito. La landaj delegitoj sendu fine de ĉiu monato liston de la pagintoj.
Glumarkoj: Oni povas mendi de L.K.K. Folio po 10 ekzempleroj kostas 1 resp. kupono.
Tombolo: L.K.K. aranĝos tombolon dum la kongreso. La tuta profito iros al "La Internacia Fervojisto". Ĉiuj kongresanoj kunportu donacojn: librojn aŭ aliajn specialaĵojn de sia lando.
Mendo de trajnbiletoj: Por ricevi pli detalajn informojn vi turnu vin al viaj landaj fervojaj instancoj. Ni petis nian fervojan administracion pri rabato por familianoj kaj pensiuloj, kiuj ne alimaniere ricevas ĝin. Petu trajnbiletojn de via lando al Stokholmo (ŝipe) Turku - Helsinki, aŭ laŭ la longa vojo Stokholmo - Haaparanta - Tornio - Helsinki L.K.K. ordigos viajn trajnbiletojn por kienajn en Finnlando dum la kongreso laŭ viaj deziroj Ŝipbiletojn mendu vi mem aŭ via vojaĝoficejo al ŝipkontoro Nyman & Schultz, Pasagerare-avdelningen, Skeppsbron 22, Stockholm. Ekveturo ŝipe de Stokholmo la 10-an de junio, alveno al Turku matene la 11-an. Se oni samtempe mendas 25 aŭ pli da biletoj, oni ricevas rabaton de 20 %. Mendante ŝipbiletojn menciu: "Esperanto-grupvojaĝo la 10-a de junio de Stokholmo al Turku". Estas nepre necese mendi la kajutbiletojn sufiĉe frue.
Informoj: En la ĉefstacidomo funkcios informangulo sabate la 11-an de junio de la 8-a horo matene ĝis 20-a vespere. La akceptejo mem troviĝas en la kongresejo.
Monŝanĝejoj: En la ĉefstacidomo, V R Vojaĝoficejo kaj bankoj ĉe la kongresejo.
Manĝado: L.K.K. ordigos komunmanĝojn en restoracio de la kongresejo malmultekoste. Manĝkuponoj estas aĉeteblaj en la antaŭtago ĉe la restoracio.
Loĝado: L.K.K. rezervas hotelĉambrojn kaj amasloĝejojn por mendintoj. Vidu la aliĝilon.
Preseraroj en la aliĝilo: La bankkonto ne estas 60263 sed 60264. Mi alvenos ... junio.

## L E T E R V E S P E R O

Komence de marto la Esperanto-rondo de Fervoja Direkcio en Debrecen aranĝos letervesperon okaze de la kursfino. Skribu multnombre al Allamvasutak Igazgatòsàga-Eszperantò kör DEBRECEN - Hungario

## LA "ORIENT-EKSPRESO" 75 -Jara

ROMANTIKO, AVENTUROJ, SURPRIZOJ. el "LA PRAKTIKO"

La fama ORIENT-EKSPRESO estas la vagonaro por diplomatoj, negocistoj kaj spionoj. Ĝi estas ĉefe konata kiel dekoracio por filmoj pri spionado kaj detektivaj romanoj. Ĝi ekzistas jam de pli ol sepdek-kvin jaroj. Kelkaj kuraĝuloj iniciatis ĝin en la jaro 1876, sed nur en 1883 ĉiuj malfacilaĵoj estis venkitaj, kaj la fervoja trajekto Parizo-Kostantinoplo fariĝis fakto. Tiam la vojaĝo daŭris 81 horojn kaj 30 minutojn, do 30 horojn malpli ol la normalaj fervojaj veturoj. Ĉar mankis tiutempe internaciaj interkonsentoj, kaj ne ekzistis fervojaj regularoj, oni devis venki multajn teknikajn, ekonomiajn kaj diplomatiajn malfacilaĵojn, sed la multaj penoj ne estis vanaj. La plano efektiviĝis!

En la unua tempo la vojaĝoj per la Orient-Ekspreso estis plenaj de streĉo, romantiko kaj surprizoj. La normalaj reloj ekzemple ĉesis ĉe Bukureŝto; la vojaĝantoj devis elvagoniĝi kaj per boato transiri la Danubon, kie atendis alia vagonaro por transporti ilin al VARNA, bulgara urbo ĉe la Nigra Maro. Tie atendis denove ŝipo por porti ilin al la turka ĉefurbo KOSTANTINOPLO.

En 1919 oni ekuzis novajn vagonojn, sed la inĝenieroj ne kalkulis kun la lokomotivo. En SUBITICA (Jugoslavio) la vagonaro ĝemante haltis -la karbo elĉerpiĝis! La vojaĝantoj devis eliri kaj serĉi lignon en la ĉirkaŭantaj arbaroj. Ankaŭ alian aventuron spertis la Orient-Ekspreso. En januaro 1929 dum dek-unu tagoj ĝi estis blokita de amaso da neĝo en distanco de 145 kilometroj de Kostantinoplo. La personaro devis vadi tra la neĝo por en tiu tre malriĉa regiono akiri viandon, legomojn kaj panon por la vojaĝantoj, kiuj malsatadis en la senhejtaj vagonoj. Sed same malsatantaj lupoj vagadis tiam ĉirkaŭ la O-E.

Post la dua mondmilito en januaro 1946 la Orient-Ekspreso denove ekfunkciis inter PARIZO kaj VENECIO. En la fino de la sama jaro la trajekto estis plilongigita ĝis BELGRADO kaj SOFIO, kaj en 1947 ĝi denove iris al KOSTANTINOPLO. En 1950 oni jam povis per ĝi vojaĝi ankaŭ de PARIZO al ATENO. Inter la du mondmilitoj la kompanio perdis sian monopolon por la fervoja ligo inter Oriento kaj Okcidento. Aperis la Arlberg-Orient-Ekspreso kaj la Simplon-Orient-Ekspreso, per kio la veturofteco pligrandiĝis kaj multaj aliaj urboj ricevis ligon al la famiĝinta fervojlinio de politikistoj, komercistoj kaj spionoj.

## RADIO - ELSENDO EN ESPERANTO

"VOĈO DE AMERIKO"

La tutmonda radio-servo de la Usona registaro, decidis dissendi eksperimentan serion da programoj en Esperanto, kun komenco la 11-an de marto 1960. Oni preparas 6 programojn 30-minutajn kun tre varia enhavo: intervjuoj, diskutrondoj, raportoj pri kulturo, literaturo, ekonomio, scienco, tekniko kaj la eksterlanda politiko de Usono, novaĵoj el la Esperanto-movado kaj "Demandoj kaj Respondoj" pri Ameriko. La programo direktas D-ro William Solzbacher, membro de la Akademio de Esperanto, en kunlaboro kun fakuloj kaj eminentuloj usonaj kaj alilandaj. En ses sinsekvaj semajnoj ĉiu programo estos dissendata trifoje ĉiun vendredon: la unua elsendo je 12-12,30 h. sur la ondlongo de 41,90 m. la dua elsendo je 13-13,30 h. sur la ondlongo 19,72 m. kaj la tria elsendo je 23-23,30 h. sur la ondlongoj de 31,28 m. kaj 30,74 m. (M.E.T.)

La Voĉo de Ameriko decidos laŭ la spertoj kaj rezultoj de la eksperimenta serio pri eventuala regula uzo de Esperanto. Raportoj pri la ricevo de la programoj, rimarkoj pri la enhavo kaj demandoj respondotaj en la rubriko: "Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko" estu adresataj al D-ro W. Solzbacher, Voice of America, Rm.2528 HEW, Washington 25, D. C. Usono. Sendinto de demando por la rubriko "Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko" laŭeble ricevos antaŭan informon pri la tago, en kiu la respondo estos donata antaŭ la mikrofono.

## P R E S A Ĵ O

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de nia Majstro D-ro L.L.Zamenhof, la Sociala Organizo de la Germana Federacia Fervojo, eldonis dulingvan (Germane kaj Esperante) broŝuron. Verkis ĝin nia ŝatata amiko D-ro Wilhelm Lang, el Frankfurt (M); ni gratulas al li kaj al la germanaj kolegoj por lia sukceso.

INTERSTENO: Nur Interstene korespondas C. Daglio, Litta-Parodi-Alessandria (Italujo). Lingvoj: Esperanta,Franca,Angla,Germana,Hispana,Portugala. Nepre skribu regule.
DEZIRAS KORESPONDI: S-ro Stati Statev, str. "Anton Nedelĉev" 2 - VARNA (Bulgario)

RAPORTO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO EN LA JARO 1959

SIDEJO: DOPOLAVORO FERROVIARIO - Piazza Calderini, 4 BOLOGNA
SEKRETARIO: Via Donato Creti, 61 BOLOGNA

===============

1) - Ĝenerala superrigardo

La Itala Fervojista Esperanto-Asocio (I.F.E.A.) estas kultura asocio kaj konservas sin tute for de politikaj, religiaj kaj socialaj ideologioj.

La I.F.E.A. aliĝis al la F.E.I. (Federazione Esperantista Italiana) kaj al U.E.A.(Universala Esperanto-Asocio) kiel aliĝintajmembro, kaj al I.F.E.F.(Internacia Federacio Esperantista Fervojista) kiel landa rondo.

2) - Aktivaĵoj de la Asocio kaj de la membroj

La I.F.E.A. organizis la VI-an Internacian Fervojistan Esperanto-Kongreson en Verona de la 3-a ĝis la 8-a de majo 1954-a, sub la Honora Prezidanteco de la jama Ministro pri Transportoj Lia Ekscelenco Hon. Mattarella. Al tiu kongreso partoprenis 621 anoj. Oni atingis, do, unu el la plej multnombraj ciferoj de partoprenantoj el niaj kongresoj. Tiu sukceso dependis krom de la bela geografia situo de la urbo Verona, ankaŭ de la senlaca propagando kaj sencesa laboro de la anoj de nia Grupo en Verona.

Nia Prezidanto Kav. Zacconi kaj nia Sekretario p.i. Gimelli estis respektive Prezidanto kaj Membro de la Loka Kongresa Komitato de la 40-a Universala Esperanto Kongreso okazinta en Bologna de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1955-a. Tiu kongreso estis Jubileo de la 1-a Universala Esperanto Kongreso de Boulogne sur mere (Francujo).

Nia membro D-ro Inĝ. Nanni kaj nia Prezidanto Kav. Zacconi estas respektive Delegito kaj Vic-delegito de U.E.A. en Bologna. Nia membro D-ro Inĝ. Azzi (eks estrarano de UEA) estas Delegito de U.E.A. en Como, Nia membro Rag. Filippi estas Vic-delegito de U.E.A. en Romo kaj reprezentanto de Universala Ligo por Italujo; nia ano Kav. Ramolfo estas Delegito kaj D-ro Borione estas Vic-delegito de U.E.A. en Torino. Niaj anoj Franzina, Gimelli, Maudente, Quarone, Rosso, Tognetti kaj Zorzi estas Fak-delegitoj de U.E.A. respektive en Vicenza, Bologna, Milano, Torino, Firenze kaj Bolzano.

3) - Aktivaĵoj kaj manifestacioj dum la jaro 1959

Dum la lasta jaro 1959 la I.F.E.A. partoprenis la jenajn manifestaciojn kaj disvolvis la sekvantajn aktivaĵojn:

- Partoprenis multnombre al 11-a I.F.E.F.-Kongreso en Linz (Aŭstrujo) kaj al ĝia Postkongreso en Vieno dum la monato de majo 1959.
- Organizis la IX-an Nacian Kunvenon de Fervojistoj-Esperantistoj kiu okazis la 22-an de septembro 1959-a, en la kadro de la 30-a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 19-a ĝis la 24-a de septembro 1959-a en Firenze, ĉefurbo de Toskana Regiono.
- Multnombra delegacio partoprenis, sekvo de invito de la Franca Fervojista Esperanto-Asocio, al la jara Ĝenerala Kunveno de la F.F.E.A. okazinta en Parizo la 13-an de decembro 1959-a.
- La I.F.E.A. organizas, kiel kutime, ĉe la Profesia Lernejo de la Fervoja Administracio ĉe la Centra Stacidomo en Bologna, en kunlaboro kun la "Dopolavoro Ferroviario", Esperantan kurson. Tiu kurso ekkomenciĝis la 6-an de novembro 1959-a kaj daŭros proksimume ĝis la monato de junio 1960. Dum la inaŭgura manifestacio ĉeestis la reprezentantoj de la Kultura Sekcio de la "Dopolavoro Ferroviario". Parolis D-ro Inĝ. Otello Nanni, emerita altrangulo de la Fervoja Administracio, kaj nia Prezidanto Kav. Zacconi.

Ankaŭ en aliaj urboj okazis Esperantaj Kursoj, organizitaj de la lokaj sekcioj de "Dopolavoro Ferroviario", en kunlaboro kun I.F.E.A.-Grupoj, por disvastigi la Internacian Lingvon inter la fervojistoj; ekzemple: Verona, Milano, Trieste, Torino, Cagliari, Genova, Sampierdarena, Padova, k.t.p.

- Fervojistoj Esperantistoj membroj de I.F.E.A. partoprenis la aranĝojn por la solena memorigo de la centjara datreveno de la naskiĝo de nia Majstro D-ro L.L.Zamenhof, nome la imponan ekspozicion organizitan en la salono "Stabat Mater" ĉe "Archiginnasio" (antikva universitato en Bologna), de la 10-a ĝis la 31-a de decembro 1959; la memorigan oracion faritan ĉe la Universitata kolegio "Irnerio" de Adv. Bagnulo la 15-an de decembro matene kaj fine la valoran koncerton ĥoran, lirikan kaj instrumentan kiu okazis la saman vesperon ĉe la salono "Bossi" de Konservatorio.

La ekspozicio kiu enhavis, inter alie, fervojistan sekcion kie estis elmontrataj fervojistaj kongreslibroj kaj gazetoj, estis vizitata de la parlamentanoj de la Emilia Regiono kaj de la membroj de la honora komitato starigita por tiu okazo.

- La Prezidantoj de pluraj sekcioj de "Dopolavoro Ferroviario" reklamis la Fervojistajn Esperanto-Kursojn per taŭgaj grandformataj koloraj afiŝoj.
- Ni povus konsideri kiel sukceson la fakton ke "Voci della Rotaia" (Voĉoj de la Relo) fakgazeto eldonita de la Fervoja Administracio, je la unua fojo publikigis artikolojn pri Esperanto. Alia fakgazeto kiu interesiĝis pri nia movado, estas "Wagons Lits" dumonata revuo de la Internacia Kompanio de Litvagonoj kaj de la Grandaj Eŭropaj Ekspres-trajnoj. En ĝi aperis belegan kaj bunte ilustritan artikolon dupaĝan majstre verkitan de nia eminenta honora membro Grafo A.G.Fontanive.
- La I.F.E.A. eldonas regule la "Informa Bulteno"-n kiu atingas jam la 10-an jaron, ĉar la unua numero aperis dum la monato de junio 1951-a.
- La "Dopolavoro Ferroviario" komisiis min transdoni al la 11-a I.F.E.F.-kongreso siajn salutojn kaj bondezirojn pri sukceso kaj disvastigo de nia lingvo precipe inter la fervojistoj.

Kvankam dum la jaro 1959 diversaj niaj anoj eksiĝis, aliaj fervojistoj plifortigis nian anaron.

Jen, konciza bildo, de la Fervojista Esperanto Movado en Italujo.

Bologna, la 20-an de januaro 1960

LA SEKRETARIO DE I.F.E.A.
(Ginelli p.i.Germano)

## ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO (I.F.E.A.)
## REDAKTORA RAPORTO PRI LA JARO 1959

REDAKTEJO: Bologna, Via Donato Creti, 61 - Tel. nº 359071

La bulteno de I.F.E.A., nomita "Informa Bulteno", aperis la unuan fojon en junio 1951, pro tio la bulteno nun fariĝis 10-jaraĝa; ĝi aperas monate (kelkfoje nur dumonate).

La I.F.E.A.-bulteno estas multobligita, per tajpita stencilo, en 350 kopioj po numero kaj estas dissendita al ĉiuj membroj de I.F.E.A., al ĉiuj grupoj de Itala Esperanto Federacio, al ĉiu redaktoro kaj reprezentanto de eksterlandaj sekcioj de I.F.E.F., al la redakcioj de la ĉefaj esperantaj gazetoj, al la radio-stacioj kiuj disaŭdigas esperantlingve, kaj al personoj kaj organizaĵoj en Italujo kaj eksterlande, kiuj interesiĝas pri Esperanto. Bedaŭrinde kunlaborado flanke de la membraro, krom kelkaj esceptoj, preskaŭ tute mankas, sed, kvankam I.F.E.A.-bulteno, estas nur informilo por membroj kaj simpatiantoj (eventualaj venontaj membroj), ĉiaspecaj artikoloj, precipe kun fakaj temoj estas bonvenaj. La redaktoro pro tempomanko ne povas verki ofte apartajn artikolojn, sed publikigas tiujn, de tempo al tempo, verkitajn por "La Internacia Fervojisto".

La I.F.E.A.-redaktoro klopodis por havigi al la redaktoro de "La Internacia Fervojisto" kelkajn belajn fotojn grandformatajn por la frontpaĝo de nia I.F.E.F.-organo. En la frontpaĝo de la nº 1 de oktobro 1959 de "L.I.F." aperis unu el tiuj fotoj montrantan la trian elektro-trajnon E.T.R.-300, kromnomita "Settebello", de la Itala Ŝtatfervojo, kun artikolo kiu klarigas la karakterizojn de la elektro-trajno mem; tradukita de I.F.E.A.-redaktoro el la fakgazeto "Voci della Rotaia".

La redaktoro klopodis por aperigo de artikoloj kaj novaĵoj pri Esperanto en la nacilingva gazetaro, precipe en la fakaj gazetoj. Nia honora membro, Grafo A.G. Fontanive aperigis dupaĝan artikolon kun koloraj fotoj en "Wagons Lits" dumonata luksa revuo de la Internacia Kompanio de Litvagonoj kaj de la Grandaj Eŭropaj Ekspres-trajnoj. Ankaŭ "Voci della Rotaia" (Voĉoj de la Relo), fakgazeto eldonita de la Ŝtata Fervoja Administracio, publikigas novaĵojn pri Esperanto-kursoj, pri Esperanto novado inter la fervojistoj kaj pri Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso.

La "Informa Bulteno" de I.F.E.A. estas sendita regule al la redaktoroj de la fervojista Esperanto-gazetoj de la jenaj landoj:

| | |
|---|---|
| Aŭstrujo | -Bulteno de la Aŭstria Sekcio de I.F.E.F. |
| Belgujo | -B.E.F.A.-Bulteno |
| Danlando | -D.E.F.A.-Bulteno |
| Finnlando | -Esperanta Finnlando |
| Francujo | -La Fervojisto |
| Germanujo (Okcidenta) | -Bulteno de G.E.F.A. |
| Hungarujo | -Hungara Fervojista Mondo |
| Jugoslavio | -Jugoslava Fervojisto |
| Nederlando | -Fervojisto |
| Svislando | -Svisa Fervojisto |

De la supremenciitaj landaj sekcioj ni ricevis interŝanĝe la koncernan organon.

Krom la I.F.E.A.-Bulteno estas sendita al la sekretarioj de IFEF-sekcioj en jenaj landoj: Aŭstralio - Britujo - Bulgario - Finnlando - Hispanujo - Germanujo (Orienta)- Norvegujo - Svedujo.

Okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de nia Majstro D-ro L.L.Zamenhof, oni organizis en Bologna, en kunlaboro kun la Esperanto Grupo "A.Tellini", Esperantan ekspozicion kun speciala Fervojista sekcio, kie estis elmontrata la kolekton de ĉiuj organoj de la I.F.E.F.-sekcioj.

La Redaktoro de "Informa Bulteno" de I.F.E.A.